

Kimbanguismo, 2-a parto
Claude Gacond, 137-a radioprelego, 1966.05.18 & 1966.05.21

Cl.- Atentu esperantistoj! Ĉi tie vi aŭdas la Svisan Kurtondan Radiostacion. Parolas gesinjoroj Claude kaj Andrée Gacond.

Pasintan semajnon ni rakontis, kiel svisa medicina studanto nomata François Choffat malkovris la ekziston de potenca nigrula eklezio nomata kimbangua honore al Simono Kimbangu. Ni prezentis al vi la personecon de tiu kristano, kiu ne nur predikis amon al la malamiko kaj kristanan neperfortemon, sed kiu praktikadis modele tiun moralon sub la battoj de bagnogardistoj en la vestoj de punlaboristo.

A.- François Choffat vizitis tiun kimbangan eklezion en Kongolando pasintan februaron kun Jean Laserre, la sekretario de Internacia Movado por Reamikiĝo.

Cl.- Tiu kontakto kun nigrula kolektiveco unumiliona organizita ekster ĉia misia helpo kaj dum persekutado kvardekjara estas multilate interesa.

A.- Unuafoje eŭropanoj oficiale kontaktis tiun kimbangan eklezion. Pro tio granda akceptado estis organizita de la kimbanguanoj en la flughaveno Ndjili-Léopoldville. Almenaŭ mil kvincent personoj atendadis François Choffat kaj Jean Lasserre. Longa atendado pro trihora malfruiĝo de la aviadilo.

Cl.- Preĝo malfermis la akceptadon. Poste multaj kimbanguaj delegacioj sin prezentis dum la homamaso kortuŝe ovaciadis. Fine blankuloj ne venis al ili kiel malamikoj.

A.- Eble kelkaj vortoj pri tiu eklezio estas necesaj.

Cl.- Tiu kolektiveco nomas sin **Eklezio de Jesuo-Kristo sur la tero far la profeto Simono Kimbangu**. Ĝin reorganizis post la sendependiĝo de Kongolando la tri filoj de la profeto. La persekutoj tiam ekĉesis.

A.- La influo de Simono Kimbangu estas eksterordinare granda. Pro tio multaj religiaj grupetoj ankaŭ sin pretendas kimbanguaj. Tiujn sektojn oni tamen ne konfuzu kun la priskribata movado.

Cl.- Simono Kimbangu ne havis la intencon fondi propran eklezion. Pasintan semajnon ni rakontis, kiel li estis famiĝanta pro kuracado de malsanuloj. Li nur povis prediki la kristanan fidon kelkajn monatojn. La persekutado tuj estis orkestrita kaj la kondamno lin forigis el la popolo.

A.- Persekutado ĝenerale fortigas la persekutatojn. Ĝi ankaŭ disvastigas la detruendan ismon.

Cl.- Tiun regulon bone bildigas la historio de la kimbanguismo. Kimbangu antaŭ la persekutado estis konata nur en sia tribo Bakongo. Sed lia mortkondamno kaj poste lia enkarcerigo lin famigis pli ol liaj kuracadoj povintus fari. Apenaŭ konata arbitra resanigisto ricevis la aŭreolon de martiro. Li nun fariĝas simbolo. Por patriotoj li simbolas la genton kaj por la religiaj amasoj li simbolas la Kriston. Li fariĝas afrikaniĝo de la ĝis nun fremda kristanismo. Li fariĝas la profeto.

A.- Jen fonto al dinamismo. Jen ĝermo al formiĝo de varbokapabla kolektiveco. Sed la misioj observas. La registaro timas ribelemon. Persekutado povas denove frapi. Kaj dank'al ĝi la kimbanguismo povas disvastiĝi.

Cl.- Oni rakontas, ke pli ol tridekmil kimbanguanoj estis deportitaj. Multaj el ili vivis dum dek jaroj en punlaborejoj. Ili povis praktiki neperfortan kristanismon kaj ĝin prediki per la ekzemplo. Agoj parolas pli ol predikoj.

Kimbanguismo, 2-a parto
Claude Gacond, 137-a radioprelego, 1966.05.18 & 1966.05.21

A.- Tiuj deportadoj permesis al la kimbanguismo venki sian triban devenon. Ĝi fariĝas super-triba ligilo.

Cl.- François Choffat kaj Jean Lasserre devis esti tradukitaj dum tiu kontakto kun la kimbanguanoj en plej diversajn tribajn lingvojn, en la kikongan kaj lingalan en Léopoldville, en la svahilian en Stanleyville. La kimbanguismo rifuzas identiĝon kun aparta tribo kaj je la okuloj de siaj membroj ĝi simbolas la landon Kongio kaj la universalecon de la kristanismo.

A.- Jam dum la persekutoj la kimbanguismo sentis sin universala. Blankuloj estis akceptitaj kiel membroj jam antaŭ la foriro de la eŭropanoj. Dank'al la ekzemplo de Simono Kimbangu la anoj de tiu eklezio ne respondis al la persekutoj per ksenofobio aŭ amareco rilate al la blankuloj.

Cl.- En tiu medio povis formiĝi fortaj personecoj kapablaj pardoni. Tiu nigrula eklezio estas certe unu el la belaj floroj de la kristanismo. Ne multaj eklezioj kapablis rezisti al la tento de la memdefendo antaŭ la atakoj kaj malamoj. En Afriko ili eĉ ĝenerale simbolas la uzon de perforto por la varbado de adeptoj.

A.- En la ribela situacio de la hodiaŭa Kongolando tiu eklezio ekludas pacigan rolon. Nombrante unu milionon da membroj en dekkvinmilionala lando ĝi estas sufiĉe forta por arbitracii konfliktojn en regionoj, kiuj vivas tribajn batalojn. Ĝi faras tion originale. Ĝi sendas fanfarojn en la regionojn, kie eĉ la registaraj policianoj ne kuraĝas iri. La fanfaroj ludas muzikon kaj anoncas reamikiĝon. La ribelintoj, kiuj vivas kaŝe en la arbaro kaj kamparo, venas al la kunirado. Ili estas sub la protektado de la kimbanguanoj, kiuj estas morale sufiĉe fortaj por kontroli ilian sorton kaj ilin helpi retrovi normalan socian vivon.

Cl.- Ĉu ne estas bela ekzemplo de spirita forto? François Choffat aŭdis la urbestron de Stanleyville publike omaĝi la konstruan repacigan rolon de tiu tipe afrika eklezio. Niaj elsendoj estu kontribuo, kiu permesu al multaj homoj admiri la kuraĝon de tiuj afrikanoj, kiujn oni ofte kredas sovaĝaj.

A.- Tiu kolektiveco certe posedas en si la dinamismon al unuigo de la afrikanoj super la triboj kaj kristanaj skismoj hereditaj de eŭropaj kaj usonaj konfliktoj.

Cl.- Pri tio ni reparolos dum venonta elsendo.

A.- Vi aŭdis Radio-Svislandon.

Cl.- Claude kaj Andrée Gacond diras al vi : Ĝis reaŭdo !

-oOo-